Theodor Fontane,

# En la ĝardeno

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La framboj per altaj siaj
tigoj disigis nin,
sed tra l' foliaro niaj
manoj mem trovis sin.

La heĝo per alto sia
ne povis malhelpi ĝin:
mi metis la berojn al via
buŝo kaj kisis vi min.

Se irus tra la ĝardeno
ankoraŭfoje vi,
volonte je via reveno
atendus dum horoj mi.

*Traduko de la Germana poemo "Im Garten" de* THEODOR FONTANE *(Teodoro Fontano, ∗1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1998-07-19.*

*MR-313-1a / Arg-112-224 (2003-12-30 21:28:41)*